

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Accademia
Internazionale
delle Scienze

International
Academy
of Sciences



San-Marino

Internationale
Akademie der
Wissenschaften

Académie
Internationale
des Sciences

5a BAKALAŬRIGA UNIVERSITATA STUDADSESIO BUS 5

Lublin (PL)

2004-09-21 / 09-29

(1704 pfR)

Fünfte Universitäre B-Studientagung

Quinta Sessione Universitaria „B“

Fifth „B“ University Session

Cinquième Séance Universitaire „B“

Programo de BUS 5

La studadsesio BUS 5 de AIS okazas de 2004-09-21 al 2004-09-29 en la **Instituto pri Media Inĝenieriko** de la politekniko de Lublin en Pollando (PL). La adreso de la instituto estas strato Nadbystrzycka 40B (PL 20-618 Lublin). ĝia pola nomo estas *Institut Inżynierii Ochrony Środowiska*.

Organiza prezidanto de la sesio estas AProf. Witold Stępniewski prof. dr. habil. phil., vic-rektoro de la Lublina politekniko.

Honora komitato:

OProf. Dr. habil. H. G. Frank (prezidanto)

OProf. R. J. Selten HSdAIS

Prof^T L. C. Zaleski-Zamenhof

Jerzy Buzek

W. Stelmachowski

Małgorzata Handzlik MdEP

1 Oficialaĵoj

dato	horo	evento
09-21 ma	vespere	Interkona vespero
09-22 me	20:00–20:30	sekcikunsidoj 1–6
09-27 lu	8:00–11:30	Kursfinaj ekzamenetoj
	11:30–18:15	Studfinaj ekzamenoj
09-28 ma	8:00–13:00	Studfinaj ekzamenoj
	vespere	fermo de BUS 5

2 Kursoj kaj prelegoj

2.1 Sciencaj kursoj

La sekvaj kursoj – validaj po unu stud-unuon (stu) – okazos ekde merkredo ĝis dimanĉo (09-22/09-26); en blokoj nomataj A/B/C/D/E¹. La paŭzoj tagmezaj kaj vesperaj nomiĝas M kaj V. Bonvolu atenti, ke ĉiu kurso okupas kvar blokojn ene de tiuj kvin tagoj, sed ne ĉiam je la sama horo. Pri detaloj bonvolu konsulti la programtabelon fine de la programo.

- **OProf. Dr. habil. H. Frank:** Kibernetika Pedagogio.
- **OProf. Dr. habil. H. Frank:** Statuto kaj historio de AIS.
- **OProf. H. D. Quednau:** Faŭno kaj flaŭro de Eŭropio.
- **AProf. Stępniewski:** Grundo kaj varmeja (forceja) efiko.
- **AProf. J. Lechowski:** Teorio de feliĉo kaj sukceso.
- **EProf. B. Leonov:** Eŭropa turismiko.
- **EProf. Lewanderska-Quednau/OProf. R. Sachs:** Parazitaj malsanoj kaj unua helpo en turismo.
- **AProf. R. Corsetti:** UEA kaj Akademio de Esperanto aŭ la vojo de Esperanto. (*La horoj de tiu kurso estas nur provizoraj!*)

¹Por eviti miskomprenojn ni ne uzas la literon Ĉ por marki listerojn.

Nur per kursoj kun amplekso de minimume ok 45-minutaj lecionoj eblas akiri stud-unuojn (stu). Bonvolu informiĝi antaŭe, kiuj kursoj havas tiun amplekson.

2.2 Sciencaj prelegoj

- **EProf. Mag. Alicja Lewanderska-Quednau:** Rolo de polaj sciencistoj kaj esperantistoj por eŭropa uniigo. Rolo de Prof. B. Dybowski.
- **OProf. R. Selten HSdAIS:** La teorio de la ludoj. Vendrede, 09-24, 11:00 en la aŭlo de la politekniko.
- **Bac. K. Śliwinski:** Katolika Universitato Lublin kaj ĝia Esperanto-tradicio.
- **AProf. Dr. habil. J. Lechowski:** La taskoj de junuloj en nova periodo.

3 Kandidataj finekzamenoj

La finekzamenoj por kandidatoj, kiuj celas originale aŭ per adapta adopto akiri ĉe AIS la agnoskon de la akademia nivelo de bakalaŭreco okazas je lundo (09-27) kaj mardo (09-28), laŭ surloke afiŝota horaro. La kandidatprelegoj estas publikaj, kaj ĉiuj BUS-anoj estas bonvenaj ĉeesti la prelegojn de la kandidatoj kaj la postajn diskutojn. Parolaj fakekzamenoj (nepublikaj) kaj skribaj ekzamenoj (se necesaj) okazos laŭ horaro afiŝota de la Ekzamenofico. Dum BUS 05 ne eblas la akiro de gradoj pli altaj ol bakalaŭreco.

La ekzamen- kaj studregularoj de AIS ŝanĝiĝis je 2004-06-14, sed ĉiu, kiu studentiĝis antaŭ tiu dato, rajtas ene de la valideco de sia legitimilo diplomiĝi laŭ la malnovaj regularoj.

La Ekzamenofico atentigas kandidatojn, ke prezentiĝo al la fina ekzameno sen antaŭa regularkonforma kompletigo kaj disponigo de ĉiuj necesaj dokumentoj al la Ekzamenofico povas kaŭzi aŭ *malakcepton de la kandidatiĝo* aŭ *postulon de krompago superanta la normalan ekzamenkotizon* pro la kroma laboro. Finan konstato pri la plenumiteco de ĉiuj kondiĉoj nuntempe necesaj por akiri la agnoskon de sciencista grado de AIS oni jam ne ricevos pli ol du jarojn post la fina ekzameno. *Eksvalidiĝos do titol-agnoskoj, se eventualaj skribe fiksitaj kompletig-postuloj ne estos plenumitaj* de la kandidato dum tiuj du jaroj.

**Por eviti tiajn problemojn bv. rekontroli,
ĉu ĉiuj viaj ekzamen-dokumentoj jam troviĝas ĉe la Ekzamenofico!**

4 Kadra Programo

Je la alventaga vespero, 2004-09-21, okazas interkona vespero, kiu samtempe estas malfermo de la sesio. Krome AIS invitas al solenaĵo kun prezentado de la orkestro *Filharmonia Lubelska* je vendredo, 2004-09-24, 18:00.

Por interesuloj okazos ekskursoj al la historia urbocentro de Lublin kaj al la Martirologia Muzeo en Majdanek (eksa koncentrejo).

5 Organizaj detaloj

5.1 Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj

Ĉiu BUS-ano rajtas senpage enskribiĝi kaj partopreni kursojn (tion inkluzivas la aliĝkotizo). Kontraŭ aparta kotizo (po 0,3 AKU por unu kurso) oni ricevas oficialan partopren-ateston, ĉeestinte minimume 3/4jn, kaj noton, se oni sukcesis en la kursfina ekzameneto. La ekzameno povas okazi en skriba formo, ekzemple per elekt-respondoj aŭ liberaj respondoj konsistantaj nur el nomoj, nombroj aŭ unuopaj vortoj, tiel ke sufiĉas kompreno de ILo kaj ne necesas propra esprim-kapablo. La ekzameneton oni rajtas partopreni sen ĉeesti la kurson dum la sama BUS, do iamaj kursanoj povas ripeti la ekzameneton.

Ankaŭ pri kursoj ofertataj en la *instruteko* povas okazi ekzamenetoj por studentoj, kiuj aŭ luprenis aŭ aĉetis kursmaterialon aŭ pagas kurskotizon.

Se studento ekzameniĝas sen 3/4-a partopreno en kurso, li devas sukcesi minimume per la noto 7/10 por ricevi ateston.

La kursfinaj ekzamenetoj okazos ĵaŭde (09-02) vespere, se nenio alia estas anoncita dum la kursoj. La BUS-anoj, kiuj intencas akiri kurs-atestojn, enskribiĝu al la kursoj ĉe la BUS-oficejo.

Bonvolu atenti, ke je 2004-06-14 ŝanĝiĝis la regularoj de AIS. Kiu studentiĝis post tiu dato, povas akiri studunuojn nur per kursfina ekzameneto; puraj partopren-atestoj ne plu validas.

5.2 Prelegoj

La preleg-kunsidojn gvidas la dekanoj aŭ vicdekanoj de la koncerna sekcio, aŭ taskitoj de ili. La partopreno en prelegoj (kontraŭe al partopreno en kunordigita preleg-serio) ne egalvaloras al kurspartopreno.

Debutprelegojn prezentas nove alvokitaj profesoroj, *docentiĝprelegojn* estontaj plenrajtaj docentoj de AIS. La prelegoj daŭras po 45–60 minutojn, inkluzive de diskuto kaj paŭzeto. La preleglingvo estas ILo.

La sama tempo estas je dispono por *invititaj prelegoj* (en iu ajn oficiala lingvo de AIS) kaj por *projekt-akceptigaj prelegoj* (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan originalan akiron (ne adopton) de grado de AIS.

Ankaŭ liberaj ISKanoj (t. e. ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj apartenas al AIS) rajtas prezenti t. n. *liberajn prelegojn*, pere de la dekanano de la koncerna sekcio. Ili rajtas okazi en iu ajn oficiala lingvo de AIS kaj daŭri po 25–40 minutojn.

Ankaŭ *konciz-prelegoj* (10–20 minutoj) povas okazi en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili estas oferteblaj ankoraŭ post la starigo de la BUS-programo, tra la koncerna (vic)dekanano aŭ (vic)fakarestro. Temoj de konciz-prelegoj ne listigitaj en la programkajero estos afiŝataj dum BUS laŭ la informoj transdonitaj de la prelegontoj al la BUS-oficejo.

5.3 Aliĝo

Aliĝilojn bonvolu sendi al la senata sekretario (Dr. Reinhard Fössmeier, Rahel-Straus-Weg 19, DE-81673 München, Germanio). Informoj pri la sesio estas troveblaj Interrete ĉe www.ais-sanmarino.org/arangxoj/bus/bus05.

Bonvolu atenti, ke aliĝoj ne estas trakteblaj sen pago de la aliĝkotizo. La kotizo ne inkluzivas ekzamenkostojn, kurskotizojn (por atesto), kostojn por loĝado kaj manĝado. Aliĝo ne estas transdonebla.

Pagi aliĝkotizon devas ankaŭ *kursgvidontoj* kaj *prelegontoj*. Kurs- kaj prelegproponoj kaj aliĝoj por ekzameno estas trakteblaj nur post alveno de la BUS-aliĝkotizo.

Ĝis unu monato antaŭ la komenco de la sesio la aliĝkotizo estas nur 0,3 AKU, poste 0,5 AKU. Kotizo por unutaga partopreno en BUS estas po 0,2 AKU. La kotizo estas pagebla laŭ jenaj vojoj (ĉiam kun indiko de la pagocelo kaj de la nomo de la aliĝanto):

- al la Germana konto 2051-305 de AIS ĉe Postbank Hannover, banko-kodo 25010030, Swift-kodo PBNKDEFF250; IBAN DE19 2501 0030 0002 0513 05, BIC: PBNKDEFF.
- al la UEA-konto de AIS: aisc-j.
- ĉeke (nur en EUR, kun aldono de 0,15 AKU) al la trezoristo (OProf. B.-A. Wickström, Humboldt-Universität, Spandauer Str. 1, DE-10178 Berlin).

ISKanoj, kies servobonhavo havas pluson de almenaŭ 0,5 AKU, povas simple deprenigi la kotizon de ĝi. Dumvivaj subtenaj membroj kaj studentoj kun valida legitimilo ne pagas BUS-kotizon, se ili aliĝas minimume kvar semajnojn antaŭ la sesio; poste ili pagas 0,2 AKU.

5.4 Mono

Kadre de AIS kostoj kaj prezoj estas indikataj en „Akademiaj Kotiz-Unuoj“ (AKU). 1 AKU nun valoras € 65,00.

La oficiala valuto en Pollando estas la Nova Zloto (PLN). Komence de aŭgusto 2004 unu PLN valoris proksimume € 0,23 (sen garantio).

5.5 Loĝado

Studentaj BUS-anoj povas loĝi en studenta domo je 12 PLN / nokto. Pri tio oni frutempe aliĝu ĉe Beata Kijak mag., b.kijak@pollub.pl / tel. +48 81 5381110.

Kelkaj hoteloj en Lublin:

- Hotelo *Dom nauczyciela* (Domo de instruisto), www.hotelsinpoland.com/domn-lub, tel. +48 81 533 8285.
- Hotelo *Victoria*, www.hotel.victoria.lublin.pl, ĉ. 500 m de la Politekniko.
- Hotelo *Lublinianka*, www.lublinianka.com, urbocentre.
- Hotelo *Europa*, www.hoteleuropa.pl.

6 Situo de Lublin

Lublin situas en orienta Pollando kaj estas ĉefurbo de la samnoma distrikto (vojevodio). Ĝiaj koordinatoj estas 22° 34' 13" de orienta longitudo kaj 51° 14' 13" de norda latitudo. Ĝi do situas proksimume sur la sama latitudo kiel Antverpeno, Lepsiko, Londono, Irkuck aŭ Calgary kaj sur la sama longitudo kiel Ateno, Sibio, Sofio kaj Kanango. La rektalinia distanco al Varsovio estas 150 km, al Kievo 570 km, al Prago 600 km, al Lvovo 190 km. (La vojaj distancoj, indikitaj ekzemple sur la urbaj retaj informpaĝoj, estas kompreneble pli longaj.)

La blazono de Lublin montras kapron kaj vinberujon sur ruĝa kaj verda fono.

Kun 360.000 loĝantoj Lublino estas la plej granda Pola urbo oriente de Vistulo.

En Lublino estas pluraj universitatoj, inter ili la politekniko (Politechnika Lubelska, mallonge PL), en kies ejoj okazas BUS 5. Ĝia rektorejo troviĝas sud-okcidente de la historia centro, en strato Nadbystrzycka 38D (PL 20-618 Lublin). Proksime troviĝas ankaŭ la studenta domo kaj la Instituto pri Media Inĝenieriko.

Lublin havas vojajn kaj fervojajn ligojn en ĉiujn direktojn. La centra aŭ ĉefa stacidomo pol-lingve nomiĝas *Główny* (gŭuvni), la norda stacidomo *Północny* (puŭnocni).

Turismo kaj vidindaĵoj

La turisma ret-paĝo de Lublino proponas diversajn rondirojn tra la urbo:

- Multkultura rondiro (szlak wielokulturowy): En la Jagelona tempo Lublino troviĝis ĉe la ĉefa vojo inter la tiama ĉefurbo de Pollando, Krakovo, kaj la ĉefurbo de la princlando Litovio, Vilno. La tiutempe evoluanta urbo gastigis multajn Polajn monarĥojn. Precipajn privilegiojn kaj subtenon ĝi ricevis de la unua Jagelono, reĝo Ladislao (Władysław) la Jagelono, kiu kontribuis ankaŭ al la multkultureco de Lublino.





- Jagelona rondiro de la Lublina Unio (Jagielloński szlak Unii Lubelskiej). Lublino ludis gravan rolon en la historio de la Pola-Litova Unio. En la traktado de Ladislao la Jagelono pri la transpreno de la Pola trono partoprenis la Lublina starosto Włodko z Charbinowic. La jaroj de la Jagelona regado estis por la urbo tre utilaj. Privilegioj, oftaj vizitoj de reĝoj kaj kunvenoj de nobeloj certigis al la urbanoj prosperon kaj al la urbo specialan lokon sur la mapo de Pollando.
- Memoriga rondiro pri la Lublinaĵoj (szlak pamięci Żydów Lubelskich). Lublino estis de pratempoj simbolo de Juda aŭtonomio, florado de Juda kaj Jida kulturo kaj urbo kun grandaj meritoj pri Judismo. Ĝis hodiaŭ ĝi estas en la historio de sanktaj kromnomoj la „Jerusalemo de la Pola Reĝlando“, kaj de iom da tempo uzatas la populara nomo „Juda Oksfordo“. Ĉi-lasto indikas, kiom grandan rolon la Juda Lublino ludis en la evoluo de la Judisma scienco.



La Krakova Pordo (Brama Krakowska) en Lublin

Lublin posedas kastelon el la 12a jarcento, urbodomon el la 14a jarcento kaj multajn aliajn historiajn konstruaĵojn, parte detruitajn dum la milito kaj rekonstruitajn. La eniron al la historia centro regas la Kastela kaj la Krakova Pordoj.

En la kvartalo Majdanek, sud-oriente de la centro, troviĝas eksa nazia koncentrejo kun memoriga ŝtata muzeo (*Państwowe Muzeum na Majdanku*). Ĝi situas ĉe strato *Droga Męczenników Majdanka 67* („vojo de la martiroj de Majdanek“).

Skiza stratplano de Lublin (PL). Informoj sen garantio. AIS San-Marino.



Interretaj informoj

- www.lublin.pl – pri la urbo, kun urbomapo
- www.pol.lublin.pl – pri la Politekniko
- www.kul.lublin.pl – pri la Katolika Universitato
- www.umcs.lublin.pl – pri Universitato Marie Curie-Skłodowska
- www.majdanek.pl – pri la ŝtata muzeo en Majdanek
- www.pilot.pl – mapoj de Pollando, kun urbomapo de Lublin
- www.ais-sanmarino.org/mapoj/lublin – informoj de AIS

Kalendareto								
	lu	ma	me	ĵa	ve	sa	di	
sep	13	14	15	16	17	18	19	sep
	20	21	22	23	24	25	26	
	27	28	29	30	1	2	3	okt

7 Programtabelo

bloko	A	B	C	D	E	V
	8:00–9:30	9:45–11:15	11:30–13:00	15:00–16:30	16:45–18:15	
21 ma	Alveno					interkona vespero
22 me	Stępniewski	Quednau	Frank	Lewanderska	Corsetti	
23 ĵa	Stępniewski	Leonov	Frank	Lewanderska	Leonov	
24 ve	Stępniewski	Quednau	Selten	Lewanderska	Frank	
25 sa	Stępniewski	Leonov	Quednau	Lewanderska	Corsetti	
26 di	Corsetti	Quednau	Frank	Leonov	Corsetti	
27 lu	kursfinaj ekzamenetoj		ekzamenoj			
28 ma	ekzamenoj					Fermo
29 me	Forvojaĝo					

Enhavo

1	Oficialaĵoj	2
2	Kursoj kaj prelegoj	2
2.1	Sciencaj kursoj	2
2.2	Sciencaj prelegoj	3
3	Kandidataj finekzamenoj	3
4	Kadra Programo	3
5	Organizaj detaloj	3
5.1	Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj	3
5.2	Prelegoj	4
5.3	Aliĝo	4
5.4	Mono	5
5.5	Loĝado	5
6	Situo de Lublin	5
7	Programtabelo	8